Referencoj

Barthes Roland: "A retórica da imagem", in: O óbvio e o obtuso (La evidenteco kaj la obtuzeco). Tradukinto: Léa Novaes. Rio de Janeiro: Nova Fronteira, 1990.

Biblio. Tradukintoj: Zamenhof (Malnova Testamento); Berveling, Rust, Beveridge, Wilkinson (Nova Testamento). Londono: British and Foreign Bible Society, 2003.

Greimas Algirdas Julien: Semântica estrutural (Struktura semantiko). São Paulo: Cultrix, 1973.:

Greimas Algirdas Julien & Courtés Joseph: Dicionário de semiótica (Semiotika vortaro). São Paulo: Contexto, 2008.

Lichteinstein Jacqueline (org.). A pintura: o paralelo das artes (La pentrarto: paralelo inter la artoj). São Paulo: Ed. 34, 2005. v.7.

Man John: A história do alfabeto (La historio de la alfabeto). Rio de Janeiro: Ediouro, 2002.

Marx Karl & Engels Friedrich: Manifesto de la Komunista Partio. Tradukinto: Detlev Blanke. Moskvo: Progreso, 1990.

Pauli Evaldo. Simpozio. http://www.cfh.ufsc.br/~simpozio/Esperanto/ALIA.html

Saramago José: Manual de pintura e caligrafia (Manlibro pri pentrarto kaj kaligrafio). Porto: Lello & Irmão, 1991.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. José LEITE DE OLIVEIRA JUNIOR
Caixa Postal 12.109
CEP 60020-970 – Fortaleza – CE
BRAZILO

http://www.esperanto.ufc.br

<esperanto@ufc.br>

Priaŭtora informo

Jozefo LEJĈ estas la Esperanta nomo de *José Leite de Oliveira Junior*, profesoro de la Departemento pri Literaturo de la Federacia Universitato de *Cearao* (Brazilo), kies oficialan Kurson de Esperanto li kunordigas. La aŭtoro esploras la rilaton inter pentrarto kaj literaturo, tradukas prefere al Esperanto, verkas poezion kaj pentras.

Maskoj – formo kaj esprimo de afrika arto

Rüdiger SACHS

Enkonduko

Kulturoj estiĝas ĉiam el diverseco de (ofte eĉ ŝajne kontraŭdiraj) tendencoj. Afriko ne faras escepton en tio. Sed kvankam neniu artoformo por si mem povas estis nomata "tipe afrika", tamen ekzistas stiloj kaj formoj, kiuj markas en sia tuteco ian afrikan arton. Nur malofte la arto en Afriko kreiĝas pro distra valoro. Skulptaĵoj kaj maskoj estas ĝenerale farataj por kultaj agoj, kvankam la dancado surscenigita de maskoportantoj – kaj kelkfoje ankaŭ la pretekstata persekuto de spektantoj – havas distrajn erojn. La dancado mem estas parto de certaj solenaĵoj el religiaj moroj kaj nur malofte gajiga amuzo. Escepton de tiu kutimo estas la arto de rakontistoj kaj kantistoj, kiuj volas distri la aŭskultantojn (sed tion nur por mono), sed iliaj historiaĵoj kaj priheroaj poemoj ankaŭ celas peri moralajn instruojn kaj utilajn konojn pri la pasinteco.

Historio retrospektiva

La Okcidenta Mondo jam fine de la 15-a jarcento ricevis la unuajn impresojn de afrika arto kiam riĉe ornamitaj bareletoj por salo. faritaj el eburo, estis portataj de portugalaj komercistoj al Eŭropo. Tiuspecaj ekzotaĵoj estis alte estimataj kaj tre multakostaj, atingeblaj nur por la bonstata "alta klaso". Daŭris ĝis fine de la 19-a jarcento, ĝis "por normalaj homoj kaj kolektantoj" artaĵoj el la afrika kontinento estis haveblaj – tamen oni alrigardis ilin kiel faraĵojn de duonsovaĝuloj. Eŭropaj kolektantoj tiam ofte preteratentis la "estetikan enhavon" de afrikaj skulptaĵoj. Daŭris longan tempon ĝis eŭropaj artistoj, pentristoj kaj skulptistoj (kiuj sin apogis en siaj verkoj precipe al la malnovgreka kaj romia artoperiodoj) favore akceptis la afrikan arton. Ili nun estis ekkomprenintaj, ke la afrikaĵoj ne respegulas la naturon mem, sed la forton de la naturo laŭ indiĝena naturkoncepto kaj religia imago.

Lignoskulptado kaj maskoj

Al la plej oftaj artoformoj en afrikaj socikomunumoj apartenas la skulptado (el ligno, ŝtono, fero, bronzo, terakoto kaj aliaj materialoj), sed ankaŭ la arĥitekturo, muziko, dancado, ritoj kun teatrecaj trajtoj kaj parole tradiciata rakontoarto. Ĉe afrikaj popoloj la arta agado okupas pli vastan spacon ol estas ĝenerale supozate. Tiuspecaj artoj estas pli multbranĉaj kaj variaj ol sekvas el kolonitempaj etnologiaj esploroj. Precipe en la maskoj kaj lignoskulptaĵoj oni povas ekkoni plej bone la karakteron kaj la intencon de la afrika arto.

La skulpt-arto estas kvazaŭ piliero de la afrika arto kaj samtempe artoformo, kiu ekster la afrika kontinento plej vaste prezentiĝis kaj diskoniĝis. Ĝiaj plej okulfrapaj formoj estas la maskoj el ligno skulptitaj por ceremoniaj prezentadoj. Tiu arto tamen lasas spacon por multaj eraroj – antaŭ ĉio pro tio, ke oni provis taksi ĝin laŭ tio, kio en Eŭropo estas rigardata "bela". Tiuĉirilate tipa estas la opinio, ke la afrika arto estas "primitiva" kaj oni, same senbaze, deduktis el tio, ke la afrikanoj estas en evoluŝtupo kun "nelerta arto" kaj ne povas atingi la forman perfektecon de la grek-romia arto.

Tiela argumentado estas neakceptebla jam pro tio, ke la ekzakta kopiado de naturaj formoj ne estas esenca markilo de "beleco". Ankaŭ estas tre subjektiva starpunkto aserti, ke la esprimo de arta verkado, kiu ne konformas al la estetikaj principoj evoluintaj en Okcidenteŭropo, estas laŭforme "neperfekta". Estetika aprezado de la afrikaj artoformoj, kiel ekzemple la maskoskulptado, nur eblas, se oni ankaŭ konsideras la celon de la lignoskulptistaj laboraĵoj, nome al kiu ili servas. Pro tio necesas ekzameni kaj paroli pri la kerno kaj la komuna fundo de afrikaj maskoceremonioj.

Maskoceremonioj

La maskodancado havas sian fonton en religiaj moroj kaj kutimoj, kiuj vokas demonojn aŭ celas komuniki kaj krei rilatojn inter ili kaj la koncerna kred-komunumo. La dancado volas samatempe memorigi la vilaĝanojn ankaŭ pri komunaj ligiloj kun nehomaj potencoj kaj supernaturaj estaĵoj de la universo. La maskoceremonio do estas la videbla revelacio de nekonceptebla potenco rigardata kiel transira enkorpigo de tio, kio superas la homan imagopovon. La realigo de tia revelacio tamen postulas la kunlaboron de la komunumo mem. La homa peranto, plej ofte la maskoportanto, do servas kiel ilo de la revelacio. Iu aŭ pluraj maskoj devas esti inventataj por diferencigi la peranton de la aliaj homoj ĉirkaŭ la scenejo kaj sekurigi, ke la dancisto mem por la daŭro de la ceremonio ĉesas esti homo sed iĝis enpersoniĝo de la spirito aŭ la praulo, kiun oni celas ceremonie voki aŭ ekzorci.

La plej gravaj kaj plej bone rekoneblaj signoj montriĝas en la vestaĵo. Ĝi signas la dian ĉeeston kaj montras la realecon, kiu superas la korpan aktualecon de tiu kiu ĝin portas. Unuasence ĝi estas simbolo, tiel kiel oni ankaŭ ĉe teatroprezentado alportas kelkajn arbobranĉojn sur la scenejon por indiki, ke temas pri arbaro. Kaj la precipa parto de tiu simbola transformado estas la masko. Nur se oni komprenas la transformiĝon kaj bazan rolon de la vestaĵo kaj de la masko, nome kiel ĉeesto de supernatura estaĵo, oni povas kapti sub kiu "krea animstato" la lignoskulptisto laboras.

Influo en eŭropan arton

La eŭropa artisto, influata de afrika arto, ĝenerale ŝajnvidas en la skulptaĵoj nur la provon de la maskoskulptisto prezenti naturajn formojn plejeble abstrakte. Tio estas koncepto, kiu troviĝas en la kubismo kaj similaj artoformoj manifestiĝintaj en plej alta grado aŭ eĉ ĝis la ekstremo. Tio do estas misinterpretado pro nescio pri la spirita rilato, kiu influas la stilon de afrika skulptisto. Eĉ kiam temas pri videbla modelo, la artisto klopodas prezenti ties kaŝitecon aŭ vizion, kaj ne ĝian eksteran aperobildon. La stilo de la skulptisto respegulas certan, tute propran opinion, kiu lin influas laŭ imagopovo kaj imagokapablo sub kiuj li vivas kaj laboras.

La vasta kadro de la komunuma kredoimago ĉiam enhavas spacon por arta libero kaj improvizado. Se la demono, kies ĉeeston la masko celas voki, estas horora, oni ne atendas de la skulptisto, ke ĝi estu ekzakte kiel tiu, kiu jam ekzistas de la demono el pli fruaj ceremonioj, sed ke li alvoke perceptu ĝian timovekan ĉeeston kaj tion interpretu en sia verko. La artisto do plej ofte estas tute libera, formi ian terurvekantaĵon laŭ propra sento – antaŭkondiĉe ke li restas en la kadro de la kutimaj reguloj kaj tradicioj. Afrikaj maskoskulptaĵoj baziĝas sur longsperta majstreco pri kreaj teĥnikoj.

Simpligo de la formoj

Speciale rimarkinda estas la talento alveni al mirigaj laŭformaj simpligoj, elirante de naturaj formoj. Detale rigardante maskojn oni havas la impreson, ke la artisto volis transsalti la naturan eksteron por kapti ĝian esencon, kaj ke li el tiu ekkono poste kreis novan formon. Ĉe iuj maskoj la modelo oftas kun formo kaj ĉarmo de antilopo. Sed tio kio ankoraŭ restas de la antilopo estas densigo de la plej karakteraj partoj de la besto, nome la fleksiĝemaj korpolinioj kaj la gracilo kompletigitaj per dekoraciaj ornamaĵoj. Per tio la ekstera antilopoformo estas subigita por iĝi fabela vivaĵo, kiu pere de antilopeca formo trovas simbol-figuran prezentadon.

La simpligo de la natura modelo ofte instigas la skulptiston ellabori ties geometriajn formojn laŭ propra inspiro. Tiel ekz. okuloj povas fariĝi cirkloj aŭ kvadratoj, eĉ oblikvaj streketoj, kaj tiaj simpligitaj formoj trovas novajn spacrilatajn elementojn kaj ekvivalentojn en la elmontro de aliaj trajtoj. Ekzemploj de tia geometrieco estas maskoj, ĉe kiuj la okuloj fariĝas reliefe elstarantaj aŭ plate konveksaj, sed estiĝas svingaj linioj diagonale kaj transverse sur la tuta maskosurfaco kio forte akcentas la tuton.

Arta ritmo muzika

Ĉe multaj maskoj ripetiĝas la interpretado de certaj vizaĝaj trajtoj, ekz. brovoj, okuloj kaj lipoj, per simetriaj kurbiĝoj tiel, ke estiĝas ritma egaleco kiu memorigas muzikajn ritmojn. Kelkaj maskoj personigas bubalodemonojn, la aliaj akvodemonojn. Plej miriga eĉ estas la evoluigo de arĥitektaj formoj fare de multaj skulptistoj. Se la masko estas portata vertikale antaŭ la vizaĝo, ĝia surfaco ŝajnas tute ebena; sed "surmeta masko" (kiu estas portata horizontale sur la kapo) estas plene uzata de la skulptisto laŭ tridimensia rilato al la spaco.

Dum la dancado la maskoportanto montras al la spektantoj la maskon de diversaj flankoj, tiel, ke ĉiu danc-pozicio rezultigas alian bildimagon. Fakte la impreso estas tute alia se oni rigardas ĝin de antaŭe aŭ de la flanko. Kaj kiam li klinas sian kapon ekestas denove tute alia impreso. De antaŭe oni povas konsideri la muzelon aŭ la dentojn kiel la plej gravan parton de la misteraĵo, sed ili tute malaperas vidate deflanke aŭ desupre kiam la oreloj kaj kornoj prenas al si la gravecon kaj impresas kiel geometriaj formoj.

Ĉe aliaj maskoj iu homsimila vizaĝo atingas plej altan "stilan" prezentadon: la makzelaj ostoj fariĝas elstaraj konusoj kun mole rondigita supraĵo, sur kiu estas horizontal-ebenaj okuloj. La kavoj sub la brovoj estas longe streĉitaj vertikalaj facoj (simile al ŝelo de ostro) en kiu kuŝas la okuloj. Tia kuraĝa pritrakto de surfacoj (io tia eble inspiris la kubismon) estis ne imagebla sen evoluinta spacosento. Masko fakte estas por la eterno rigidiĝinta momento, kiu pro la dancekstaza moviĝo dum la maskoceremonio ricevas novan vivon kaj eniron en la ritmon de la homa ekzistado.

Maskodancado

Kiam la maskoportanto dancas, la "eterna momento" kaptita de la skulptisto estas metata en movon kun ritmo de muziko kaj forte ekscitas la sentojn de la spektantoj en duobla ritmosento, kiu elradias de la skulptaĵo – kaj eĉ pli senteble de la ekscita tamburmuziko. Ĉio tio plifortigas la impreson pri la socia kaj kultura enhavo de la rita dancado ĉe la spektantoj, kiuj ofte saltas sur la scenejon kaj ĉirkaŭdancas la maskon. Precipe la fakto, ke la artisto dum skulptado de la masko jam estis virtuale plenigita de la celo, al kiu la masko devos servi, lin instigas al tute libera pritraktado de la formo. Li ĉiam celas indikon de senkorpaj formoj kaj ne kopiadon de la naturo.

Bildo 1: Kovrilpaĝo de "SCIENCO KAJ KULTURO" n-ro 3(1996). Prof *Sachs* prelegas pri maskoj kaj lignoskulptaĵoj en Afriko.

La plej multaj afrikaj skulptaĵoj, precipe la maskoj, estas faritaj el ligno. Kiel portanto de simboloj por prauloj aŭ spiritoj, demonoj aŭ "la Mallumo", ili unuavice plenumas certajn taskojn. Al tiuj taskoj la skulptisto devas adapti la stilon de sia verkaĵo sen forlasi la tradician vojon. Preskaŭ neniam li provas krei naturajn trajtojn

aŭ real-proksimajn estaĵojn. Tial oni nur malofte trovas vivograndajn figurojn en la afrika arto, kaj ankaŭ la malgrandaj figuroj ne respegulas naturajn proporciojn. Ĝuste pro tio la skulptarto estas tiom frapa kaj miriga en sia efiko.

Spiritaj kaj bestaj figuroj ĝenerale ja ne pretendas aspekti kiel la prabildoj, sed ili povas kaj celas anstataŭi ilin aŭ ties magia alvoko. La memorfiguroj pri prauloj, kiuj troviĝas en religiaj relikvokestoj, aŭ la gardad-figuroj (plej ofte el ŝtono) por protekto de domo, korto kaj kampo estas aŭ la spiritoj mem aŭ iliaj adorantoj.

Tiaj artaĵoj plej ofte estas potenc-portantoj kaj ilia efiko en religia rilato dependas unue de la lerteco de la artisto kaj due de la ritoj kiuj ĉirkaŭas ilin. La specifa signifo de la skulptaĵo do dependas de la socia kaj kultura medio en kiu ĝi estas farita. Pro tio fiaskis la provoj por komerca fabrikado de veraj artaĵoj. Kopioj faritaj pro profitavideco aŭ por kontentigi fremdlandajn vizitantojn kiel potencialajn aĉetantojn estas senvivaj kaj arte senenhavaj.

Resumo

La plej multaj afrikaj artaĵoj estas forte ligitaj al tradicio kaj determinataj laŭ tribaj strukturoj kaj religiaj kredoj. Ne la imitado de la naturo, sed la en ĝi realigataj fortoj ricevas klare difinitajn signifojn. Maskoj kaj figuroj estas portataj de dia potenco. La artistoj donas al ili realan formon, faras evidentaj, videblaj, preskaŭ "palpeblaj" la fortojn de dioj, demonoj, fantomoj, forpasintaj parencoj, kaj pere de tio konservadas la universajn kaj mondajn kreajn fortojn.

Adreso de la aŭtoro
Prof. Dr. Rüdiger SACHS
Vor dem Brückentor 3
DE – 37269 – E s c h w e g e
GERMANIO
<isaesachs@aol.com>

Priaŭtora informo

La aŭtoro laboris de 1976 ĝis 1978 kadre de germana evolu-projekto kiel la direktoro de "*Ecole de Lutte Anti-tsetse*" ("Instrucentro pri Lukto Kontraŭcecea") en *Bobo-Dioulasso*, Supra Voltao (la nuna Burkino), unu el la plej gravaj okcidentafrikaj centroj de maskoskulptado kaj maskodancado.

Ekologiaj, ekonomiaj kaj sociaj argumentoj por neŭtrala internacia lingvo

Wolfgang GÜNTHER

"La rilato inter ekonomia prospero
kaj homa evoluo estas nek
aŭtomata nek rekta."
(el la Raporto de la
UN-Programo pri Evoluigo,
angle "UNDP", 1998)

Jen la situacio:

- En nia nuntempa mondo ĉiun 6-an sekundon mortas 1 infano pro subnutriĝo.
- Ĉiutage forpereas ĝis 130 planto- kaj bestospecioj.
- Ankoraŭ validas, ke ĉirkaŭ 20% de la mondloĝantaro disponas pri ĉirkaŭ 80% de la mondresursoj kaj de la el tiuj produktitaj varoj.
- Laŭ takso de UN perforto kaj malriĉeco igis 21 milionojn da homoj fuĝintoj kaj 175 milionojn migrintoj.
- De pli ol 30 jaroj ĉi tiu mondo ĉiujare konsumas 30% pli da resursoj ol la naturo povas regeneri kaj trotoksas la biosferon je 40%.

En tio, kulturo kaj komunikado grave rolas kaj la alta rapido de la homaj aktivaĵoj plifortigas ĉi tiujn tendencojn. La "ni" fariĝis kunhoma **kaj** biosfera pronomo. Ni homoj kiel pensa viva materio esence estas parto de la naturo kaj nia partnereco kun ĝi determinas nian sorton.

La evoluiga problemo de la tutmondiĝanta homa komunumo estas **la antagonismo inter la justeco- kaj la medio-krizoj**. Ĝi fariĝis **LA** rekonilo de nia epoko kaj ĉe tio en la justecokrizo kontinue kaŝiĝas la antagonismaj fortoj inter libereco kaj egaleco. La dilemo konsistas en la postulo, ke, solvante la justecokrizon,